

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №4, Aprilo, 2009

*Komence de ĉi jaro niaj gesamideanoj el nia partnera E-kolektivo de svisa Lucerno sendis tre interesan E-artikolon pri la samtempulo de nia Majstro, fondinto de La Internacia Ruĝa Kruco Henry Dunant. Dankon al lucernanoj! Nia sekretario, Doktorino Gertrude Novak afable konsentis prelegi pri la vivo kaj agado de s-ro H. Dunant. Jen estas mallonga artikolo, verkita surbaze de ŝia elpaŝo.*

## Henry Dunant, samtempulo de L. L. Zamenhof



Henry – fondinto de la Ruĝa Kruco, naskiĝas la 8-an de majo 1828 en Ĝenevo. Li estas sentema infano. Atente li registras malriĉecon kaj aflikton. Ofte li akompanas la patrinon por viziti malsanulojn kaj malriĉulojn kai por donaci iomete da mono aŭ laŭtlegi ai ili el la Evangelio. La famillio vojaĝas en la jaro 1836 al Marseille kaj Toulon, kie la 9-jara Henry indignas pri la malhumanaj, ja eĉ barbaraj situacioj kaj fartoj en la prizonoj. La juneco de Henry, kiel li skribas en siaj memoroj, estas feliĉa, malgraŭ lia patro ofte estas ekster la hejmo kaj la urbo pro komercaj aferoj. “En la aĝo de dek jaroj”, li skribas, “estis mi eta aristokrato el la plei prestiĝa parto de la aristokrataro”. Frekventante liceon li, krom “religio”, en neniu alia fako elstaris kaj ne finis la gimnazion. Sed li multe legas kaj interesiĝas pri la multnombraj ĝenevaj societoj, prefere pri la sciencaj kaj religiaj. En 1849 Henry eklernis ĉe bankodomo la metion de komercisto. Ek de la sama jaro li renkontiĝas ĉiuĵaŭde kun kelkaj kamaradoj de la Almozosocieto. Hejme aŭ en ĉambro de la Evangelia Societo okazas vesperaj bibliaj diskut-rondoj. Henry estas organizanto kaj stimulanto en unu persono. Laŭ la vortoj de kamarado, li kapablas: religi distranĉitajn ligojn, revenigi dubulojn, kuraĝigi malfortulojn kaj entuziasmigi hezitulojn.

En la aĝo de 25 jaroj la junulo maturiĝas al plenkreskulo. Li decidas partopreni kaj kunlabori en kolonioj. La ĝenevaj financuloj flaras profit-donajn komercojn en Afriko. La honesta filo de komercisto volas ĉion efektivigi, kion li lernis en la kontoroj de Ĝenevo. En la tempospaco de nur dekdu jaroj Henry fondis la Societon de la Junaj Kristanaj Viroj (1852), estis decida partoprenanto ĉe la starigo de la Monda Unuiĝo de la Societo de Junaj Kristanaj Viroj (1855) kaj agis por la subskribado de la Ĝenerala Konvencio de 1864, el kiu efektiviĝis la Ruĝa Kruco.

En 1959 Henry atingis Castiglione en la proksimeco de Solferino. Ĵus finiĝis unu el la plej sangaj bataloj depost “Waterloo”. Post la konfrontado inter 150 000 francoj kaj sardoj sub la gvido de Napoleono la III-a kaj 150 000 aŭstroj sub la imperiestro Francisko-Jozefo restis 40 000 mortintoj kaj vunditoj, Henry ŝtoniĝis dum momento pro la aspekto: sur la batalkampo, kiu plenas de ĝemegoj kaj de kortuŝegaj dolorkrioj de la vunditoj kaj mortontoj, la okazaĵo fariĝas absolute neeltenebla. Matene, la 25-an de junio Henry ordonis sian koĉeron al Brescia por aĉeti nutraĵojn kaj tion, kio plej necesas. Li restis ĝis la 30-a de junio 1859 sur la batalkampo kaj plenumis unuan helpon kaj donas konsolojn al la mortantoj. Ĉi tio, malgraŭ ke li scias, ke li povas fari tre malmulton, li ja estas nek kuracisto nek bona samariano. Ĵus li donis mildigon kaj kvietigon al ege vundita hungara soldato. Tio perpleksigis aliajn helpantojn. Do, kiam la virinoj vidas, ke li flegas eĉ vunditojn el ĉiuj nacioj, ankaŭ ili sekvas lian ekzemplon kaj krias: “Tutti fratelli! Ĉiuj estas fratoj”. Ek de nun ili helpas sen diferenco al amikoj kaj malamikoj. Sen esti konscia pri tio, ili jam uzas principon, kiu estos la ĉefe vojdona, pionira novaĵo de la venonta Ruĉa Kruco: la neŭtraleco de ĉiuj vunditoj. Henry ne povis forgesi la spertojn el Solferino kaj en 1962 verkis la libron “Un Souvenir de Solférino.” La libro ne disvendiĝis tra la librejoj. Li

disdonis kaj sendis ĝin celate al ĉiuj multinfluaj homoj kaj potenculoj, kiuj troviĝis en Eŭropo: princoj kaj princinoj, politikistoj, diplomatoj, ministroj, filantropoj kaj aŭtoroj. La reagoj; venke grandiozaj. Henry vojaĝis tra Eŭropo kaj varbis en la domoj de la princoj, dum hejme en Ĝenevo liaj kunuloj antaŭpreparis "la Konferencon de la Espero". Ĝi estas oficiale malfermita la 26-an de oktobro 1863. Tridekses personoj ĉeestis. Dekses ŝtatoj estis representataj. Generalo Guillaume-Henri DUFOUR malfermas la asembleon kiel prezidanto de la Internacia Komitato. La delegitoj deklaris respekti la decidojn de la konferenco. La Artikolo 8-a diras: La helpistoj portas en ĉiuj landoj kiel ekkonantan signon blankan brakbendon kun ruĉa kruco. La 10-an de decembro 1901 li estas honorata kune kun la franco Frédéric PASSY per la unua Nobelpacpremio. En 1903 li fariĝas honora doktoro de medicino. Henry Dunant mortas la 30-an de oktobro 1910 en Heiden. La entombiĝo okazas la 2-an de novembro en la tombejo "Sihlfeld" en Zuriko.

## Papa Paska Saluto

Papo Benedikto la 16-a ankaŭ ĉi-jare daŭrigis la tradicion, kaj inter multaj aliaj lingvoj voĉlegis sian paskan saluton ankaŭ en Esperanto. Kiam li eldiris la vortojn "Feliĉan paskon en Kristo resurektinta", esperantistoj en la placo Sankta Petro en Vatikano levis verdajn ŝildojn por montri la vorton Esperanto. Ĉi-jare estis pli da esperantistoj ol kutime en Vatikano, ĉar ĉeestis ankaŭ kelkaj eksterlandanoj, kiuj planis partopreni la Internacian Junularan Festivalon de Itala Esperanto-Junularo. La festivalo estis lastmomente nuligita pro detrua tertremo en la regiono, sed ne ĉiuj aliĝintoj povis aŭ volis nuligi sian vojaĝon.

(Libera Folio)

## Nobel-premiito denove kandidatos

Laŭ decido de la balota komisiono de la 10-a de aprilo, la germana sekcio de la politika movado "Eŭropo – Demokratio – Esperanto" (EDE) rajtas partopreni en la eŭropaj balotoj 2009 en Germanio. Tio signifas, ke ĝis la komenco de junio la germana ŝtato presigos almenaŭ 64 milionojn da balotiloj, sur kiuj troviĝas ĝia nomo. Ankaŭ la nomoj de la 10 kandidatoj de EDE-Germanio – kun Nobel-premiito prof. d-ro Reinhard Selten sur la unua loko – troviĝos sur ĉiu voĉdonilo.

(Libera Folio)

## El nia leterkesto

(temas pri la Kongreso de Espeanto-USA, kiu okazos 22-25 de Majo en Sankta-Luiso, Misurio) …Ŝajnas al mi, ke ĝis nun ni ne havas ĉeestontojn el Ŝikago. Tio estas granda surpizo al mi.

Amike, Ron Glossop

**Adreso (provizora)**

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

**Estraro:**
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

**MEMBROKOTIZO**

Membro-subtenanto ; $40 jare;
Familia membro : $30, Regula: $20
Studenta aŭ pensiula: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

**KUNSIDO**

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:**

28an de Aprilo – 100-jariĝo de Ivo Lapenna

26an de Majo – Esperanto-USA Kongreso en Sankta Luiso

28an de Junio – tradicia pikniko

